

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



9

SEPTEMBRO 1960 * JARO XXIX

BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Ĥristova, Stefan Kiraĝlev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanoncoj — 1 levo por vor-
to; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albanio: Inĝ. Cefo Fico 44 Rruga
Stafa, Tiranë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio
Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255
Moskva K-9

Nederlando: Ru Bossong Flora-
plein 23, Eindhoven.

Rumanio: Mihail Popescu, Cal. 13
Septembrie 65, Bucuresti 5.

Ĥ N H A V O

V. Oljanov. Altkvalita semado — riĉa rikolto (ĉefartikolo)	1
V. Oljanov. 45-a Universala kon- greso de Esperanto	2
Esperanto disaŭdigoj	5
указание на ЦК на ДКМС за откри- ване курсове по есперанто	6
D. Ĉolakova. Pli da atento al la junularo	7
Eŭgenia Morariu. Kun la ruma- na karavano al Târnovo	9
Ada Lisiĉnik. Leningradanoj (versaĵo)	11
Nikolaj Zidarov. Poemo pri la malĝojo de Arakĉal (versaĵo)	11
Ruĵa Ĉerneva. Rila montaro	11
En vasta maro (kanto)	12
Organiza vivo (Haim Levi. En- dormiĝintaj sur siaj laŭroj. Irina Ĉukova — Stara Zago- ra, St. Kadiev — Sofio)	14
D-ro T. Todorov. Esperanto en la servo de la scienco kaj la profesioj	15
Tra la gazetaro	15
Recenzejo. Iv. Kovaĉev. Ĉina an- tologio	16
Sur la kovrilo: 45-a Universala kon- greso en Bruselo	

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nume-
ro de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa monato.
Nur kiel escepto gravaj aktua-
laj materialoj estos akceptataj
ĝis la 25-a de la antaŭa monato.
La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda interli-
nia spaco kaj marĝeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

ALTKVALITA SEMADO — RIĈA RIKOLTO

En la pasinta numero ni publikigis ĉiujn kongresajn decidojn. Jam ni estas en la komenco de la agadsezono. Jam de la unua tago ni devas komenci la plenumon de la kongresaj decidoj. Unua tasko de la societoj estas bone pristudi tiujn decidojn kaj ilin konkretigi rilate al la specifaj kondiĉoj de la loko. Jam nia movado plikreskis kaj kune kun tio niaj taskoj komplikiĝis, — pro tio ni jam ne povas rezulte agi sen bone pripensita kaj akceptita plano. La societoj devas labori laŭ 3- aŭ 4-monataj planoj, kiuj entenu ne nur liston kaj enhavon de la regulaj ĝeneralaj kunvenoj (tio estas nepre necesa), sed ankaŭ pri la aliaj entreprenoj (varbado de membroj, kelektado de kotizo, kursoj, abonigado ktp.).

Venas la sezono por amasa malfermado de kursoj. Granda malhelpo en tiu rilato estas la manko de lernolibroj. Eble en ia grado ni povos malgrandigi tiun mankon per stencila multobligo de lernolibro. Tio tamen estas paliativo. La societoj kaj lokaj agantoj devas serĉi manierojn por adaptiĝo al la kondiĉoj. Oni instigu la instrumentadojn sen lernolibro. La societoj devas interesigi materiale kaj morale la gvidantojn de tiaj kursoj. Ĉar ja gvidado de kurso sen lernolibro postulas pli grandan sperton kaj talenton kaj pli ampleksan laboron fare de la kursgvidanto. Kaj tiaj lektoroj nun estas al ni ege necesaj. Kaj pro tio oni devas ilin ŝpari, doni al ili pli amasajn kursojn.

Tre grava problemo estas la stabiligo de la organiza stato de la societoj. Iuj societoj post kongreso malstreĉas siajn fortojn. Tion ni ne devas permesi. Kontraŭe, ni devas utiligi la grandan sukceson de la kongreso por rikolti bonajn rezultojn. Multaj societoj por esti plenrajtaj en la kongreso pagis la membrokotizon nur por duonjaro. Urĝa tasko estas kolekti la ceteran kotizon kaj elŝuldiĝi al la asocio. Oni ĉiam devas strebi antaŭen. Neniam plu ni permesu malpliigon de la regula membraro.

Multaj gekamaradoj abonis al BE por duonjaro. La estraroj kaj niaj aktivuloj tuj invitu ilin daŭrigi sian abonon. Nun ni povas utiligi la postkongresan entuziasmon por abonigi ĉiujn esperantistojn al nia organo por la dua duonjaro. Eĉ tiuj kiuj deziras aboni por tutjaro ricevos ĉiujn aperintajn ĝis nun kajerojn. Jam neniam devas ripetiĝi la hontinda fakto, ke eĉ estraranoj ne ricevas la asocian organon.

45-a Universala kongreso de Esperanto

LA UNUAJ IMPRESOJ

Malbonaj. Ĉe la ĉefstacio nenia signo de kongreso. Renkontantoj ne videbliĝas. Nur malgranda surskribo montras «Al la renkontejo». Tie — nur unu esperantisto, kiu klarigis al ni la vojon al la kongresejo. Tio jam ĵetas la unuan ombron al la kongreso.

Oni direktis nin (donis la adreson) al komuna loĝejo kaj ni denove ekvagis kun pezaj pakajoj tra la nekonata urbo. (Kia granda diferenco en la organizo de nia nacia kongreso, kiu laŭ amplekso kaj nombro de vizitantoj preskaŭ egalas la Bruselan!) Fine ni trovis la indikitan adreson kaj haltis antaŭ granda fermita pordo simila al mallibereja. Sur ĝi — malbonaŭgura surskribo: malfermata de la 17-a ĝis la 21-a. Do ni devas atendi du horojn, ni devas perdi la unuan duontagon, ni ne povos partopreni la unuajn aranĝojn. Sciante la valoron de la tempo dum la universaltaj kongresoj oni facile povas kompreni nian koleron. Sed la montri-

ĝantaj de tempo al tempo kapoj de la regantoj de tiu «kastelo» tute ne emociiĝis pro nia maltrankvilo kaj al niaj protestoj aŭtomate montris la surskribon. Ilin interesas nek la kongreso, nek la fakto, ke antaŭ ilia pordo staras kiel senhejmuloj reprezentantoj de diversaj nacioj, veturantaj tagojn kaj noktojn, lacaj pro sendormo kaj longa veturado. Jen la trolaŭdata okcidenta «libereco», pri kiu min agitis en la trajno aŭstra esperantisto, kaj kompatis nin pro la fakto, ke ĉe ni ĝi mankas (laŭ li). Ni mem rifuzas pri tia «libereco». Ĉu tia moko al homo (kaj precipe eksterlanda) povus ekzisti en nia lando?! Fine ni eksciis, ke tie ĉi ni devas enlitiĝi je la 22-a horo. Do, ni revenis al la kongreskomitato kaj direktis al ili la demandon, kiel ili opinias — ĉu ni venis en Bruselon por partopreni la kongreson aŭ por kuŝi en la loĝejo? Oni sin senkulpigis per la aventuro en Kongo, pro kiu multaj loĝejoj estis okupitaj por fuĝintoj. Finfine ĉiu el la grupo trovis ie pli aŭ malpli oportunan loĝejon.

(daŭrigo de p. 1)

Ĉiuj cirkuleroj kaj instrukciaj leteroj kiel ankaŭ tiaj materialoj en BE devas esti pristudataj kaj diskutataj en la estraroj. La praktiko de dro- niĝo de tiaj dokumentoj en la arĥivon de la sekretarioj, pri kies ekzisto nenion scias la ceteraj estraranoj plu ne estos tolerataj. Se necese, eĉ en BE ni riproĉos tiajn «sekretariojn» kaj «agantojn» kiuj tiumaniere mal- helpas la movadon. La kolektiveco estas tre grava principo en la organiza laboro, kiu certigas progreson. Pro tio estas nepre necesa regula kunsidado de la societaj estraroj. La kunsidoj devas esti bone antaŭpreparataj de la sekretario kaj la prezidanto, la decidprojektoj ellaboritaj kaj tiam la kun- sidoj daŭros mallongan tempon, ne estos lacigaj kaj enuaj.

La kongreso en Târnovo plugis bone la grundon. Ni ĵetu en ĝin alt- kvalitajn semojn por havi riĉan rikolton.

LA KONGRESAJ KUNSIDOJ

45-a Universala Esperanto-Kongreso estis solene malfermita la 31-an de julio, dimanĉe, en la Palaco de la Belartoj laŭ la tradicia programo: koncerto, salutparoloj de registaraj reprezentantoj kaj de asociaj reprezentantoj, festa parolado. La kongreso ĉi-jare estis salutita ankaŭ en la nomo de la infana renkontiĝo. En la nomo de Bulgara Esperantista Asocio salutis Ivan Sarafov.

La unua ĝenerala kunveno de UEA okazinta la 1-an de aŭgusto havis temon pri la lastaj atingoj en la landaj E-movadoj. Pri la bulgara E-movado parolis Violin Oljanov.

En la dua ĝenerala kunveno (15. VIII.) okazis diskutoj pri la raporto de UEA kaj raportoj pri la laboro de la fakorganizadoj. Pri la laboro de TEJA-kunsido (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) raportis la bulgara delegito Oljanov.

En la 45-a UK laboris du sekcioj: I — Esperanto en la lernejoj, II — La kultura kontribuo de Esperanto al la granda Projekto de UNESKO — Oriento-Okcidento.

Prezidis D-ro Ivo Lapenna, kiu starigis la demandon. S-anino Sonja Tavĉar raportis pri la Somera Pedagogia Semajno en Bohinj, Jugoslavio. En Jugoslavio estas nun 127 lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton al preskaŭ 4000 gelernantoj.

Sekvis raporto de D-ro Halina Sablovska, prezidanto de la Pola Lerneja Esperanto-Komisiono. Ŝi sciigis ke dum 1960/61 lernaro oni instruos Esperanton en 50 polaj lernejoj. Estas kreita Centra Komisiono pri enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn kun 4 subkomisionoj. Estas ellaboritaj programoj pri instruado de la lingvo al instruistoj por mezgradaj kaj elementaj lernejoj. Estas

aranĝitaj Esperantaj lekciejoj en la universitatoj de Varsovio, Poznan, Vroclav, Krakov. Estas preta Esperanta lernolibro por la elementaj lernejoj, kaj nun estas verkataj — por la mezlernejoj kaj la instruistaj institutoj.

Estis akceptita jena rezolucio:

«La Unua Sekcio «Esperanto en la lernejoj» 1) aŭdis kun aprobo la raportojn pri la nuna stato de Esperanto en la lernejoj kaj pri la klopodoj vastigi la instruadon de la Internacia lingvo en la lernejoj; 2) rekomendas al UEA daŭrigi la kampanjon «Esperanto kiel baza lingvo» kaj intensigi la klopodojn laŭ la decido de la Komitato de la 15-a de decembro 1959, prenante en konsideron laŭ la eblecoj kaj cirkonstancoj la sugestojn entenatajn en la raporto de la Internacia Pedagogia Semajno en Bohinj kaj en la raportoj de la landaj komisionoj kaj komisiitoj de diversaj landoj; 3) rekomendas ankaŭ al ILEI kaj TEJO konsideri la proponojn de la Internacia Pedagogia Semajno, kiom tiuj proponoj koncernas la du organizaĵojn.»

En la Dua Sekcio raportis Norman Smith. Estis akceptita jena rezolucio:

«La Dua Sekcio pri «Kontribuo de Esperanto al la projekto de UNESKO — Oriento-Okcidento»

KONSTATAS, ke la ĝis nun realigita interŝanĝo de esperantistaj prelegantoj inter Oriento kaj Okcidento estis fruktodona por la interkompreniĝo de la popoloj; ke esperantistaj grupoj en pluraj urboj organizas prelegojn kaj ekspoziciojn, kiuj favoras amikecon al Afriko kaj Azio kaj evoluigas utilan kulturen agadon;

REKOMENDAS, ke en laŭeble plej multaj grupoj la esperantistaj grupoj kunlaboru kun aliaj interesitoj, ankaŭ neesperantistoj, inkluzive la Naciajn UNESKO-Komisionojn kaj la ambasadojn, fondu en okcidentaj landoj societojn de amikoj de Azio kaj de Afriko, kaj en orientaj landoj societojn de amikoj de okcidento; ke tiuj societoj interŝanĝu prelegojn, sonbendojn, lumbildojn, filmojn kaj ekspozician materialon, kaj eventuale organizu en federacion, kiu povus plenumi gravan kulturen laboron pere de Esperanto; ke

la esperantistaj grupoj per interŝanĝo de surbendigitaj programoj proponu al la radiostacioj materialon, kiu servu al la sama celo; ke la grupaj kaj landaj asocioj esploru la eblecon, kaj faru konkretajn proponojn, pri interŝanĝo de personoj inter orientaj kaj okcidentaj landoj, — de kursgvidantoj kaj de aliaj personoj, kies ĉeesto en la grupo kaj la lando antaŭenigos la kulturen interŝanĝon inter ORIENTO kaj OKCIDENTO kaj tiel servos al celoj de la Esperanto-Movado.»

FAKKUNSIDOJ

Havis siajn kunsidojn Mondpaca Esperanto-movado, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, Scienca Asocio, Internacia Ligo de Blinduloj, Skolta Ligo, la arĥitektoj, la studentoj ktp.

Aparte menciinda estas la kunsido de MEM. Pola delegito starigis la demandon pri la rompo de la neŭtraleco de la UK per la enmeto en la kongresajn dokumentojn de la revenĝista libro «Faktoj pri Germanio», kiu predikas malamon al aliaj popoloj kaj militon. Li proponis rezolucion, per kiu la kunsido protestas kontraŭ tiu ago kaj proponas, ke estontece oni ne enmetu similajn libraĉojn inter la kongresdokumentojn. La pola samideano estis subtenata de delegitoj el Bulgario, Okcident-Germanio, Nederlando k.a. La rezolucio estis akceptita per 30 voĉoj (6 — kontraŭ, 8 — sin detenis).

Estis akceptita ankaŭ ĝenerala rezolucio pri paco, interpopola kunlaborado, suvereneco kaj senarmigo.

ALIAJ ARANĜOJ

La Internacia Somera Universitato okazigis jenajn raportojn:

«La angla edukado, kiel ĝi estas

vidata de eksterlando» — prof. H. L. Elvin, direktoro de la Instituto de Edukado de la Londona Universitato;

«Internacijuraj problemoj de spacveturado» — prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsultisto kaj «Fellow» ĉe la Londona Universitato;

«Komercaj rilatoj inter Kanariaj insuloj kaj Flandrio» — d-ro J. Régulo Péréz;

«Juraj problemoj pri atoma energio» — d-ro Adv. M. Roost, ordinara profesoro ĉe la Brusela Universitato;

«Esperantaj kantoj kaj ilia komponado» — Frank Merrick, «Fellow» de la Royal College of Music;

«Jogo, filozofio, celo kaj praktiko» — Lic. Tibor Sekelj;

«Toponomio aŭ studado de la loknomoj» — Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro en la Universitato de Liverpool kaj «Fellow» de University College;

«La belga literaturo vidata el Francio» — Prof. G. Waringhien.

Okazis oratora konkurso. Unuan premion ricevis Carlo Minnaja (Italio), kiu parolis je temo: «Internaciismo, patriotismo kaj ŝovinismo». Dua premio estis donita al John Wels (Anglio) pri la sama temo, la tria — al Nikola Minnaja (Italio) oratorinta pri «La sporto ĉu internacia rimedo por amikiĝo».

La internacia teatro havis du spektaklojn: «Kurioza okazaĵo» de Carlo Goldoni kaj «La friponaĵoj de Skapeno» de Molière.

Al la infanejo veturis ĉirkaŭ 550 gekongresanoj. La infana rekontigo kaj semajna kunvivado efektiviĝis proksime al Waterloo, ĉirkaŭ 20 kilometrojn de Bruselo. Partoprenis 85 infanoj de 9 landoj. Ili prezentis artan programon.

EKSKURSOJ

Ili estis kelkaj. La aŭtoro de ĉi raportajo partoprenis en tiu al Bruĝo kaj Ostende. La specialan unuaklasan vagonaron okupis ĉirkaŭ 400 gekongresanoj. Bruĝo estas vere interesa antikva urbo kun siaj arĥitekturaj monumentoj de 13-14 jarcentoj, kun siaj kanaloj kaj lagoj, malnovaj muroj kaj 7-kilometra ĉirkaŭurba aleo. En la placo nin renkontis speciala sonorila koncerto (49 sonoroj). Tagmeze en la halo de la fama Belfrido ni partoprenis flandran bankedon kun folkloraj muzikoj, vestoj, flagoj. La servistoj kaj la muzikistoj estis vestitaj en kostumoj de 16-a jarcento. La muzikado de malnovaj famaj popolmelodioj kaj abunda verŝado de biero el grandaj potoj en folklorajn argilajn pokalojn kreis tre gajan humoron. Kontentaj kaj sataj ni forveturis al Ostende, kie ni faris banojn en Norda Maro.

KONKLUDAJ PENSOJ

La imponeco kaj la brilo de la pasintjara kongreso en Varsovio mankis. Malgraŭ la penoj de LKK ekzis-

tis iuj gravaj organizaj malperfektaĵoj. Tre grava aranĝo de ĉiu kongreso estas la organizo de la renkonto kaj akcepto de la gekongresanoj kaj ties loĝigo, de tio tre multe dependas ilia humoro kaj farto dum la kongreso, la impresoj kaj la sentoj kun kiuj ili revenos hejmen. UEA devas komisi la organizon de kongresoj nur al tiaj E-organizadoj, kiuj havas sufiĉe da fortoj kaj eblecoj pri tio. Al tio verŝajne malfavoras la ĉiujara okazigo de universalaj kongresoj. Kaj ĉu ili ne estiĝis iom ŝablonaj? Ĉu ne estis danĝero, ke la esperantistoj komencos perdi intereson al ili? Ne hazarda estas la propono de pola samideano pri nova sistemo de organizo de la UK. Mi opinias, ke la ĉiujara okazigo de kongresoj estas tre laciga kaj malaltigas ties organizan kaj kulturen nivelon. UEA devas pridiskuti la demandon pri plilongo de la interkongresa periodo je 2 aŭ 3 jaroj. Tiam niaj kongresoj vekos pli grandan intereson kaj nature estos multe pli bone organizataj. Ilia propaganda efiko estos pli forta.

Violin Oljanov

ESPERANTO DISAŬDIGOJ

Hungario. Radio Miŝkolc disaŭdigas esperantan programon dum kvin minutoj ĉiun duan ĵaŭdon inter 18,30 kaj 19 h. (mezeŭropa tempo) je mezondlongo 188,8 m/1504 kilocikloj).

Italio. Radio Roma disaŭdigas en Esperanto de la 18,55 h. ĝis 19,10 h. je la ondlongoj: metroj 30,90=Mc/s 9,71; 41,24=Mc/s 7,27; 50,34=Mc/s 5,96. Jen la oktobra programo de la esperantaj elsendoj:

Mardon, la 4-an: Tra la literaturo;

Merkredon, la 5-an: Kuriero de Esperanto;

Vendredon, la 7-an: Historia-arta ekspozicio pri la spoto en Romo;

Mardon, la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio;

Merkredon, la 12-an: Kuriero de Esperanto;

Mardon, la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto;

Merkredon, la 19-an: Kuriero de Esperanto;

Vendredon, la 21-an: Novaĵoj el Italio;

Mardon, la 25-an: Italaj verkistoj: Massimo Bontempelli;

Merkredon, la 26-an: Kuriero de Esperanto;

Vendredon, la 28-an: Italaj turismaj urboj: Taormina.

ДИМИТРОВСКИ КОМУНИСТИЧЕСКИ МЛАДЕЖКИ СЪЮЗ ЦЕНТРАЛЕН КОМИТЕТ

№ 2043/24. VIII. 60 год.

До Окръжния Комитет на ДКМС
гр.

УКАЗАНИЕ

за подготовка и откриване на курсове
по есперанто през учебната 1960/61 год.

През изтеклите шестнадесет години нашата страна постигна големи успехи в социалистическото преустройство на народното стопанство, в областта на образованието, здравеопазването, изкуството и спорта. Тези наши успехи ние трябва да направим достояние на всички честни младежи и девойки по света, на всички борци за мир и дружба между народите.

Широки възможности за кореспондиране с чужбина дава международният език есперанто. Опростената граматика на този език дава възможност на всеки любознателен младеж и девойка да го изучи за кратко време и да го използва за своите международни връзки.

Курсовете за изучаване на есперанто се ръководят от Българския есперантски съюз чрез многобройните есперантски дружества в страната.

Комсомолските организации в предприятията, учрежденията, средните и висши учебни заведения да подпомогнат местните есперантски дружества да включат повече младежи и девойки в курсовете, да съдействуват за осигуряване на учебни стаи и помагала.

При откриването на курсовете трябва да се има предвид следното:

1. Учебните звена да не са по-големи от 30 души.
2. В едно и също звено да се включат курсисти с приблизително еднакво образование.
3. В курсовете да се включат младежи с еднакво работно време.
4. Всеки курсист заплаща такса за курса — 40 лв. за работници и служители и 20 лв. за ученици, студенти и войници. Сумите да се внасят в местното есперантско дружество.

Откриването на курсовете трябва да стане през месец септември.

Времетраенето на курса, броят на седмичните занятия и продължителността на лекциите се определят на място според възможностите и условията.

Централен комитет на Българския есперантски съюз
Секретар: (п) В. Олянов

Централен комитет на ДКМС
Секретар: (п) Г. Караманев

PLI DA ATENTO AL LA JUNULARO

1960 jaro markis multajn sukcesojn por nia Esperanto-movado. Brila 34-a kongreso en Târnovo. En la antaŭkongresaj laboroj multaj societoj montris modelan agadon.

Grandaj estas ankaŭ la atingitaj sukcesoj en la organizado de la junaj esperantistoj kaj por disvastigo de Esperanto inter la junularo. En la kongreso 200 junaj esperantistoj raportis pri siaj sukcesoj, pridiskutis la junularajn problemojn kaj skizis la vojon por nia estonta laboro. Fondiĝis novaj junularaj grupoj en la kadroj de la E-societoj en la urboj Tolbuhin, Kolarovgrad, Stara Zagora, ĉe la uzino «Stalin» en Dimitrovgrad k.a. Bedaŭrinde en tiaj grandaj urboj kiel Kjustendil, Dimitrovo, Petriĉ, Blagoevgrad, kie ekzistas grandaj societoj, konsiderinda parto el kies membraro konsistas el junuloj ne estas fonditaj junularaj grupoj. La sperto de la societoj en Sofio, Ruse, Pazarĝik, Polski Trâmbeŝ, Plovdiv k.a. loĝlokoj pravas, ke estas pli facile altiri al nia idealo kaj movado **estontajn** instruistojn, profesorojn, inĝenierojn, kuracistojn k.s. ol la **nunajn**. La junularo estas energia, entuziasma. Ĝi deziras multon fari kaj dediĉas por siaj idealoj multe da tempo kaj fortoj. Movado, kiu ne sukcesas altiri al si la junularon, velkas kaj certe pereos. Nia movado devas **refreŝiĝi** per novaj junaj fortoj. Tion jam komprenis iuj niaj societaj estraroj kaj turnas specialan atenton al la juna esperantistaro. Tamen tiuj societoj estas nur kelkiuj. En iuj societoj la plimulto de la membraro estas **grandaĝuloj**, dum la kunvenoj oni ne povas vidi pli ol unu aŭ du **gejunulojn**, tamen tiu bedaŭrinda stato ne sentrankviligas niajn grizharajn fratojn, ili ne strebas al varbado kaj organizado de junularo. Oni ne invitas

la novajn esperantistojn al kunvenoj, ekskursoj, do faras nenion por ke ili estiĝu aktivaj membroj de la societo. En Sofio ĉiujare estas gvidataj pli ol 20 kursoj. Kaj la plimulto de la kursanoj estas junaj homoj. Sed la junulara grupo en Sofio vivas anemie. Kaj tia grupo ekzistas nur ĉe s-to «M. Gorkij». Kial ĝis nun ne estas kreitaj ĉe la ceteraj sofiaj societoj (poŝtista, fervojista, tramista). Ĉu tie mankas junuloj? La faktoj montras la kontraŭon. Sed mankas iniciato. La societaj estraroj ne helpas la junulojn.

Kun bedaŭro tamen ni devas menciigi ke en iuj societoj oni malbone komprenas la junularon. La intereso de la junularo ofte estas apartaj, specifaj. La junuloj deziras mem gvidi, labori, iniciati kaj oni ne povas kaj ne devas neglekti tion. En aparta grupo la junularo akiras organizon sperton, pli facile sen ĝeno parolas en Esperanto, kaj tiumaniere ni forĝas novajn aktivulojn kaj gvidantojn de nia movado.

La junularaj grupoj sendepende de sia partopreno en la societaj kunvenoj devas havi proprajn aranĝojn. La praktiko montras ke la plej konvena tagordo de la junularaj kunvenoj devas konsisti el prelego prefere farita de iu junulo, pridiskuto de organizaj problemoj kaj belarta programo. Tiu ĉi programo devas daŭri maksimume 60 minutojn. Poste laŭ la eblecoj oni povas danci, ludi ian ludon, kanti kaj paroli libere Esperanton. La ofteco de la kunvenado dependas de la lokaj kondiĉoj. Sed estas rekomendinde kunveni almenaŭ unufoje semajne. La junulara grupo en Plovdiv kunvenas trifoje semajne. La junaj esperantistoj fariĝas spertaj se ili parolas esperante ne nur dum la kunvenoj, sed ĉiam kiam ili havas

eblecon pri tio. Ĉiu nia junulo devas havi kelkajn amikojn esperantistojn kun kiuj li parolu esperante. La grupaj estraroj devas organizadi kolektivajn vizitojn de filmoj, teatraĵoj, partoprenon de amuzvesperoj k.s. Oni ne devas ignori ankaŭ la datrevenojn de naskiĝoj aŭ edziĝfestoj. La kamaradeca esperantista atmosfero ĉiam aktivigas niajn junajn membrojn. En pli intimaj cirkonstancoj la homoj ne ĝenas sin, sentas sin pli liberaj.

Sed la membroj de la junulara grupo kaj precipe ĝia estraro ne devas forgesi, ke la grupo estas ero de la E-societo kaj ili devas esti la plej aktivaj en ĝia laboro. Ili estas unuaj helpantoj de la societa estraro. Ili devas plenumi ĉiujn taskojn donitajn de ĝi. Kiu alia se ne la junuloj organizos belartajn programojn, pentradon de sloganoj, aranĝos ekspoziciojn. Eldonado de murgazetoj, foto- kaj leter-tabuloj, la aranĝado de konstantaj vitrokestoj en lernejoj, universitatoj, uzinoj tre efikas al la neesperanta publiko. Se tiuj materialoj estas bone preparitaj kaj estas belaspektaj ili altiras la atenton kaj post nelonge multaj el la vidintoj jam demandas pri malfermotaj kursoj. Tiun taskon ne ĉiuj junularaj grupoj bone plenumas.

La plej grandan helpon la junuloj povas doni en la organizado de kursoj. La junuloj pli facile kontaktiĝas unuj kun aliaj. Montrante al siaj amikoj ricevitaĵajn korespondadojn, prelegante pri Esperanto, invitante pli ofte al ni la neesperantigitajn junulojn

oni povas vekti grandan intereson al Esperanto. Gravan atenton la grupoj devas turni al la superaj kaj mezaj lernejoj, al uzinoj kaj fabrikoj, kie laboras multaj junuloj. Imitinda estas la ekzemplo de la junulara grupo en Ruse. Ĝi sukcesis organizi kursojn preskaŭ en ĉiu mezlernejo kaj en multaj uzinoj. Kaj la junuloj mem gvidis la kursojn. Ses membroj de la junulara grupo en Pazarĝik ankaŭ gvidis Esperanto-kursojn.

La ligoj de la junularaj grupoj kun la komsomolaj organizaĵoj devas esti ĉiam fortaj. La grupoj devas aranĝadi entreprenojn kune kun la Komsomolo — organizado de kursoj, de komunaj kunvenoj, amuzvesperoj k.s. La eldonita cirkulero de CK de Komsomolo kaj BEA ege favoras tiurilate. Ĉiu societo devas bone utiligi ĝin. La cirkulero estas sendita al ĉiuj distriktaj komitatoj de DKJA kaj ĝi donas al ni eblecon enpenetri profunden en la junularaj medioj kaj en baldaŭa tempo ni povas kaj ni devas multobligi niajn junajn adeptojn.

Konklude, la junularaj grupoj devas esti unuaj kaj plej aktivaj helpantoj de la societaj estraroj. La junuloj mem devas proponi sian helpon. La societaj estraroj ankaŭ serĉu la junulojn, prizorgu ties spertigon en la lingvo kaj en la organiza laboro, komisiu al ili taskojn.

La estonteco apartenas al la junularo. Ni junigu nian Esperantomovadon!

Delka Ĉolakova

sekretario de JS ĉe CK de BEA

En decembro 1960 BEA organizos propagandan semajnon. Gekamaradoj, membroj de societaj estraroj, komencu tuj la preparajn laborojn, ne atendu la lastan momenton!

KUN LA RUMANA KARAVANO AL LA 34-a KO NGRESO DE ESPERANTO EN TARNOVO

Dank' al la klopodoj de niaj bukureŝtaj gesamideanoj ni ekvojaĝis al ĉi tiu kongreso kaj ni travivis kaj spertis pli multe ol ni estis revintaj. Ne nur la varma afableco kaj serve-mo de l' esperantistoj, mirinde belaj regionoj, historie interesaj antikvaj kaj modernaj monumentoj ktp. vekis nian fortan admiron, sed ĉefe la grava fakto, ke la esperantista movado — rezulte de senlaca laboro — profunde enradikiĝis kaj floras en tiu ĉi lando. Kun granda plezuro kaj dankemo ni ĝuis la restadon en Bulgario.

Trapasinte la grandiozan kaj simbole korvarmigan ponton de l' amikeco super la Danubo, jen ni alvenas nokte al Ruse, kie nin akceptas la vizitkarto bulgara: belega, moderna stacidomo — ornamita per bonvenigaj verdaj flagetoj — kiu jam ĉe la enpaŝo en la lando montras al ni tion, kion ni pli poste ĉiupaŝe spertis: la rezulton de l' heroa laboro de la bulgara popolo, efektivigita dum la lastaj nuraj 15 jaroj.

Post kelkhora vojaĝo ni atingas la sopiritan celon: la pitoreske belan kongresurbon Târnovo. Nokto. La lumoj bonvene palpebrumas. Tranoktinte en la luksa hotelo de «Balkan-turist» ni ekiras al la kongresejo. Pasante surstrate agrable nin impresas la flirtantaj verdstelaj standardoj, grandegaj sloganoj, lerte aranĝitaj ekspozicioj en la vendejfenestroj. Facile oni trovas la kongresejon, ĉar super la Oficira Domo flirtas nia verda flago.

Alveninte ĝislarne nin kortuŝas la sincere varma akcepto je la eniro de nia karavano en la kongresejon: ĝentila cedo de l' sidlokoj en la unua vico de la plen-plena salono.

Nin surprizas ne nur la granda nombro de la kongresanoj, sed ankaŭ la internacia aspekto de la 34-a: delegitoj el 12 landoj, pruvo ke la bulgaraj landkongresoj estas eventoj ne nur en la kadro de la landa Esperanto-movado, sed ankaŭ en la internaciaj rilatoj ĝenerale.

La salutvortoj de la diverslandaj delegitoj, temantaj ĉefe pri la paca karaktero de nia movado, transformas la jarkunvenon en imponan manifestacion por la mondpaco.

El la raporto de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la lokaj delegitoj ni kun ĝojo konstatas la grandan sukceson de la energia kaj senlaca agado de la asocio kaj la esperantaj grupoj en la diversaj urboj kaj vilaĝoj. Dank' al la komprenemo kaj subvencio de la landa registaro, kies helpon niaj bulgaraj gefratoj per sindona laboro primeritas kaj lerte eluzas, Esperanto jam venkis tie ĉi en pluraj rilatoj.

Laborkunsido. Laŭdo kaj severa kritiko flanke de la centra gvidantaro, premiado de la aktivuloj, emociiga sceno de la transdono de flago al la gajninto de la organiza konkurso, montras kortuŝan kaj edifan kalejdoskopon refoje pri tio, ke en nia frata lando la Esperanto-movado vige vivas kaj grandpaŝe antaŭenmarŝas.

Impona festo estis la solena inaŭguro de la Esperanto-strato (situata en la centro de la urbo), ĉiama memorigilo pri nia movado.

Emocian travivaĵon oni rezervis por ni ankaŭ per la organizo de la mitingo pri paco kaj amikeco en la tre bela somera teatro de Târnovo. La profundsentaĵaj paroladoj de la Prezidanto de la Distrikta komitato

por Paco kaj la fremdaj delegitoj substrekis ree la fakton, ke la defendo de la paco estas nia plej grava tasko. Agresivaj rondoj provas denove ardigi la internacian situacion. Ni, esperantistaj pacdefendantoj, batalu tuforte por tio, ke neniam plu la mondo fariĝu areno de detruaj militoj.

Vizitante la urbon kaj la belan ĉirkaŭaĵon de Târnovo ni konvinkigis, ke la priskriboj kaj ilustraĵoj en la nesuperebla Esperanto-revuo «Nuntempa Bulgario» estas nur palaj bildoj de la mirinde bela realaĵo.

Riĉenhavaj, sed tro mallongaj la kongrestagoj forflugis. Ni devas jam forlasi la ŝatatan urbon kaj adiaŭi kun la aro de gefratoj renkontitaj tie.

Frumatene nia karavano ekveturas per la aŭtobuso de Balkanturist por viziti pluajn regionojn de la lando. Kvazaŭ brila kolorfilmo ruliĝas antaŭ niaj okuloj: oraj garbaroj, buntaj tapiŝoj, freŝe verdaj herbejoj, serpentumantaj riveretoj. Mirinde belaj regionoj. Komforte bona aŭtostrato. Ĉe la vojrando kiel ĉarma ĉenero nin rid-salutas la ruĝaj floroj de l' papavo. Ofte sur la montodeklivoj ni ekvidas obeliskojn levitajn je la memoro de la partizanoj-herooj falintaj en la batalo por la liberigo de l' patrio dum la lasta mondmilito.

Ŝipka. La impona monumento sur la supro de Stoletov. Superbela panoramo. Veturo tra la roza valo. Mi vere ne scipovas trovi la ĝustan vorton por esprimi la profundan impreson sentitan dumvoje al Sofio.

Kazanlâk. Neforgesebla varma akcepto. Bela klubejo, kie ni estas bonvenigataj kaj ricevintaj donace glaseton kun roza akvo. Agrabla tuttaga restado en la moderna loirurbo Plovdiv. Vizito en la modele praktika klu-

bejo de la loka esperantistaro. Gentilaj gesamideanoj nin gvidas vespere al la supro de l' monto de kie ni ĝuas rigardon super la bela urbo lumigita.

Finpunkto de nia vojaĝo -- Sofio. Bela, moderna ĉefurbo, riĉa en parkoj. Vizitante la maŭzolejon de Georgi Dimitrov kaj la altartajn monumentojn ĉiam pli fortiĝas nia konstato pri la bela trajto de la bulgara popolo, kiu scias inde esprimi sian rekonon al la herooj batalintaj por la libereco.

Aŭtobusa ekskurso al la Vitoŝa monto sur komforta aŭtoŝoseo kaj de tie la ĝuo de bela panoramo super la tuta urbo, restas agrablaj memoraĵoj.

Veninte el lando, kiu same kiel niaj bulgaraj fratoj konstruas la socialismon, niaj okuloj jam alkiutimiĝis al la videblaj signoj de l' progreso, belaj konstruaĵoj de kulturdomoj, agrikulturaj kolektivoj, aspekto de novaj kaj modernaj fabrikoj, prospera vivo ne nur en la urboj, sed ankaŭ en la vilaĝoj, tamen nin forte impresas la granda nombro de lernejoj, loĝdomoj kaj bona vestiteco de la homoj, celkonsciaj kaj plenaj je vivĝojo (eĉ ne plu similantaj al tiuj pri kiuj mi rememoras en la tempo de mia vizito antaŭ pluraj jaroj).

Jen pro kio ni fartis tion, bone dum tiu mallonga tempo pasigita en la gastama, simpatia Bulgario.

En Sofio estis granda plezuro nor ni la renkonto ankaŭ kun la fama rusa verkisto, Ivan Sergejev, partoprenanta la karavanon de la paco, vizitinta Hungarion, Rumanion kaj Bulgarion, kiu informis nin pri la esperanta movado en Sovetunio.

Eŭgenia Morario

Kluĵ, Rumanio

LENINGRADANOJ

Al la Esperanta Sekcio de Leningrada
Domo de Sciencistoj

Senforta estas hom' subigi l' emocion,
paŝante sur ĉi tiu fama ter'.
Ĉi tie ĉiu ŝton' kriegis pri sufer',
imagi kiun eĉ rifuzas la racio.

Leningradano! Kiom tiu vorto
enhavas da majesto kaj grandec'!
Simbol' fariĝis ĝi de la rezist'
senmorta,
de sinofer, kuraĝ' kaj heroec'.

Forflugos jaroj, pasos eĉ jarcentoj;
l' epos' de Leningrad' fariĝos ia mit',
sed en la kor' konservos homaj
gentoj
memoron nevelkeblan de l' spirit',

simila al spirit' de Prometeo;
de l' volo, nefleksebla, kiel ŝtal';
timigis vin ja nek suferoj, nek pereoj
en liberiga por patri batal'.

Kaj jen denove staras Leningrado
en aŭreol' de l' famo kaj sukces'.
El cindro ĝin renaskis la kreado,
impeta lukt' popola por progres'.

Ĉu miru ni, ke ankaŭ lingvo nia
la neston trovis en ĉi urb' de l' ĉarm'?
Ĉi-tie ĉio nobla kaj genia
fariĝas de l' komuna viv' ornam'.

RILA MONTARO

Rila, vi — amata, neĝobрила!
Sune luma, same sub arĝenta luno —
dezirata, sonĝsimila —
(laŭ poetimag' fertila!)

Rila — perl' jarmila!
Kerno estas vi de la eterno —
viva koro nialanda, sangon oran
en la kampojn dissendanta
per torentoj blankŝaŭmantaj!

Rila — akvokanta!

POEMO
PRI LA MALĜOJO DE
ARAKĈAL!

Monpinto Arakĉalo en amar'
silentas super vitoj kaj kampar':
se restus ĝi sen aglaj idoj jen,
ne estus tiom granda la ĉagren'.
Sed velkis ĝi kaj fine brulis for',
pro la knabin' montara, en angor'.
Arbaroj per nebul' vualis sin
kaj kaŝis ofte la partizanin',
kaj ŝian liton el la musk' kun mir'
preparis ili vekki ŝin per spir':
kaj post invito pri kapitulac'
de Vela², ĝi ektondris kun minac'!

Ekploris bird' kaj rok' en monta sin',
forbrulis eĥo en la malproksim':
kaj malamik' malvarma pli ol ŝton'
alkuris kaj revenis kiel ond'.
Kaj jen kaŝite ĉe la monta rand',
la kuglon lastan kisis ŝi kun ard' —
kaj koron ŝian trafis ŝi kun brav',
senbrue ĉie iĝis post la paf';
la agloj ekkriegis pro l' batal',
ektremis kaj ekploris Arakĉal'...

Tradukis: Atanas Lakov

¹ Arakĉal — pinto en Rodopi-montaro.

² Vela Peeva — partizanino kaj esperantistino heroe pereinta en la batalo kontraŭ la faŝismo.

Per aero via freŝa — tero
varma refreŝiĝas dum somero arda.
Kaj rikolto en kampara rondo
jam maturas sub staturo granda!
Rila — mont' giganta!
Centro dum la historio — ĝentan
ja spiriton vi subtenis, kaj inviton
pri popolservado sendis
kaŝe — per vesperaj ventoj!

Rila — viva monumento!

Ruja Ĉerneva

EN VASTA MARO

Teksto: Plamen Conev

Muziko: Svetoslav Obretenov

Moderato
Es Solulo

mp 1. Ha-ras mi ru-son a-mi-kan... Ĉu vin ne tra-fis mort-fal'?

Cm Fm Cm Fm B Es
Kan-tis ni kan-ton e-fi-kan, kan-ton pri l'las-ta ba-tal'.

Cm Fm Cm Fm G7 Cm
Kan-tis ni kan-ton e-fi-kan, kan-ton pri l'las-ta ba-tal'

Ĉiuj B Refreno
mp Ba-tu nin, on-do-joj, kaj vi-pu, gvi-du nin, es-tro, sen tim'!

As Cm Es B7 Es
Ni ek-voj-a-ĝas ku-ra-ĝe — na-ĝu, ma-ris-toj,

As G Cm As Es
na-ĝu vi, ŝi-po, gli-tu kaj flu-gu sur ma-ra sen-lim'!

B Es As G7
Na-ĝu, ma-ris-toj, na-ĝu vi, ŝi-po,

Cm B Es
gli-tu kaj flu-gu sur ma-ra sen-lim'!

Havas mi rusion — amikon...

Ĉu vin ne trafis mortfal'?

Kantis mi kanton efikan,

kanton pri l'lasta batal'.

Refreno:

Batu nin, ondoj, kaj vipu,

gvidu nin, estro, sen tim'!

Ni ekvojaĝas

kuraĝe —

naĝu, maristoj, naĝu vi, ŝipo

glitu kaj flugu sur mara senlim'!

Havas mi panjon zorgeman...

Panjo, atendu min nur!

Nepre revenos mi hejmen

post malproksima vetur'.

Refreno:

Havas mi belan knabinon...

Haltu, silentu vi, kor'!

Amas vin la junulino —

nigraj okuloj, sen plor'!

Refreno:

El bulgara: Stefan Kiraĝiev

ORGANIZA vivo

ENDORMIĜINTAJ SUR SIAJ LAŬROJ

Estis iun tempon... Tial komenciĝas ordinar la fabeloj. Tiel ni komencos nian fabelon pri la Esperanto-societo en Varna.

Estis iun tempon unu vigla, viva kaj aktiva societo. Antaŭ pli ol du jaroj tiu societo sukcesis organizi tia esperanta kongreso, kiu lasis neforgeseblajn impresojn en la samlandanoj kaj eksterlandanoj, kiuj troviĝis tiam tie.

Miriado da afiŝoj, propagandplatoj kaj sloganoj kovris la stratojn. Belegaj vitrinoj kaj ekspozicio kaŭzis grandegan intereson inter la miloj da personoj, venintaj de diversaj partoj de Bulgario kaj eksterlando por pasigi tie sian ripozon.

Pri la esperanta kongreso en Varna paroladis kaj skribis ne nur niaj bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ niaj gesamideanoj el Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Italio, Francio, Aŭstrio, Svedlando, Danlando ktp. Ili esprimis siajn belegajn impresojn pri tiu rimarkinda kongreso por la organizo de kiu la esperantistaro en Varna ne ŝparis fortojn, tempon kaj rimedojn. Kaj tio donis bonan rezulton.

Sed pasis nur du jaroj kaj ŝajnas, ke la atingitaj sukcesoj kaj la entuziasmo de la albatranoj elvaporigis. La rezultoj estas antaŭ ni. En tia granda urbo, kiu kolektas kiel fokuso milojn da ripozantoj de nia lando kaj eksterlando tia neglekto de nia organiza laboro estas kondamninda. Ke la societo estas senviva montras la laboro de la societo dum tiuj du postkongresaj jaroj.

Ne klarigebla por la bulgaraj esperantistoj estas la kaŭzo pro kiu la esperantistoj en Varna ne scipovas nun propagandi per Esperanto niajn grandajn ideojn por paco, niajn sukcesojn en la socialisma konstruado, la belajojn de sia urbo.

Tra la stratoj de Varna fluas la homa toro. Sed la esperantistoj en Varna ne altiras ĝian atenton por konigi ilin pri la esenco de Esperanto, la noblaj celoj al kiuj ĝi servas. Ĉu la varnaj esperantistoj ne povas organizi dum la somero vitrinojn en la plej bonaj butikoj, esperantan ekspozicion, esperantajn gajajn renkontojn ktp. Ne forgesu, ke multaj el la bulgaraj esperantistoj invitas siajn

fremdlandajn gesamideanojn gastigi en la regiono de nia marbordo — Varna.

Ne sufiĉas la malgranda klubejo de la societo en la centro de la urbo. Ni nun ne atentu ke ĝi estas malvasta kaj malbone prizorgata. Oni tie ne povas sidiĝi, ripozi kaj legi esperantajn gazetojn kaj revuojn. Oni ne povas libere babiladi kun iu esperantisto, ĉar la klubejo estas transformita en komercan vendejon kaj akceptejon de hazardludo «Toto».

La mizera situacio en kiu troviĝas la klubejo, ankaŭ la esperanta propagando, ne estas izolitaj de la organizaj malfortoj kiuj trafis la Esperanto-societon en Varna. Estas signaloj ke inter la anaro ekzistas malbonaj rilatoj.

Ni kredas ke la esperantistoj en Varna, pri kies vigla kongresorganiza laboro ni konserve bonajn memorojn, trovos fortojn likvidi la malsanon kiu atakas la societon. Oni devas tuj entrepreni ion por likvidi la senaktivecon kaj la indiferecon. «Albatro» okupu sian indan lokon, ekirante denove antaŭen en la unuaj kolonoj de nia Esperanto-movado.

Haim Levi

Prezidanto de la KK ĉe BEA

Stara Zagora. La 5-an de julio 1960 honore al la 34-a Bulgara Esperanto-Kongreso starazagoraj geesperantistoj celebris siajn malnovajn samideanojn Todor Gospodinov kaj Petăr Kamburov, kiuj multajn jarojn sindone kaj obstine laboradis por disvastigo de Esperanto. Ili rakontis rememorojn el sia esperanta agado kaj substreki ke Esperanto estas potenca ilo por interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj.

Al la celebrataj estis donacitaj po unu bildo kaj «Sub la jugo».

Estis plenumita arta programo.

Entuziasmigitaj de la decidoj de la 34-a Bulgara Esperanto-Kongreso la membroj de nia societo daŭrigas sian poresperantan agadon. La 1-an de aŭgusto, post konciza prelego pri Esperanto de k-ino Irina Markova, estis malfermita kurso por komencantoj. La kurson partoprenas 15 geinstruistoj el suda Bulgario, kiuj nun studas en la Instituto por perfektigado de instruistoj.

La disvendado de markobrikoj ni daŭrigas sukcese. Post la kongreso sole k-do Ĉipilev sukcesis vendi markojn por 1750 lv.

La 7-an de aŭgusto geesperantistoj el Stara Zagora, Kazanlâk, v. Gorno Sâhrane kaj v. Haĝidimitrovo faris tradicion ekskurson al la tombo de la esperantisto Ivan Grudev el Stara Zagora kaj liaj kamaradoj, mortigitaj je la 4.VII.1934 de agento-provokanto en la Balkano apud vil. Enina.

Pri la vivo kaj agado de la brava anti-faŝisto Ivan Grudev rakontis k-ino Markova. Pri la tiama historia momento kaj la bataloj de la laborista klaso parolis k-do Rajno Ĉipilev.

Poste okazis nedaŭra konferenco por interŝanĝo de sperto. Oni diskutis pri la laboro de la societoj, preparo por la nova lernjaro, lernolibro k.a.

Je la fino k-do Dimo Martinov alvokis ĉiujn gesamideanojn plivigligi sian poresperantan agadon.

Irina Ĉukova

Noto de la Redakcio. Ni gratulas la samideanojn el Stara Zagora, kiuj ne malpliigis sian viglecon ankaŭ dum la someraj monatoj kaj tre bone utiligas la intereson al Esperanto plialtigitan post la brila kongreso en Târnovo.

Sofio. Je la 29-a de aŭgusto s-to «M. Gorkij» post pridiskuto de la kulturkleriga agado kaj ĝiaj formoj akceptis planon pri la kunvenoj dum la lasta kvarmonato. Ĉar ni opinias ke tiu ĉi plano prezentas intereson por ĉiuj societoj ni publikigas ĝin.

PLANO

pri la laboro de la Sofia Esperantista Societo «M. Gorkij» dum la III kvarmonato de 1960

SEPTEMBRO

5.IX. Solena vespero okaze de la datreveno de 9.IX.1944. Literatura kaj muzika programo. Prizorgas: D-ro Moraresku kaj L. Mladenova.

12.IX. Esperanto kaj la ideo pri paco — prelego de M. Langov;

19.IX. Niaj kursoj — okaze de la malfermo de la Esperanto-lernjaro. Resp. D-ro S. Kadiev;

26.IX. Ĵurnalo parolata. Redaktas N. Nikolov.

OKTOBRO

3.X. Vojaĝo en Francio. Impresojn de inĝ. S. Simeonov;

10.X. La esperanta poezio okaze de la festado de la bulgara poezio. Prelegas At. Lakov;

17.X. La mineralaj banoj kaj ilia signifo. Prelegas d-ro T. Todorov.

24.X. Pri la teĥnika progreso. Prelegas Iv. Canov.

NOVEMBRO

14.XI. Konciza historio de la korsepondado. Prelegas: D. Dobrev;

21.XI. Rememoroj pri la esperanta movado antaŭ la II-a mondmilito en la distrikto de u. Plovdiv. Raportas Ĥr. Gorov;

28.XI. Esperanto en la lernejoj. Raportas B. Simeonov.

DECEMBRO

5.XII. Anglio ĉesos esti insulo. Prelegas D. Ĉolakova;

12.XII. Tradicia vespermanĝo en restoracio «Bulgario» okaze de la datreveno de la naskiĝo de L. Zamenhof;

19.XII. La stato de la esperantista movado. Prelegas Al. Dimitrov;

26.XII. Akcepto de la nova kvarmonata societa programo.

Rimarko: La estraro de la societo deziras interŝanĝi prelegojn kun aliaj estraroj de societoj por variigo de la programo. Ni povas sendi ankaŭ surbendigitajn prelegojn kaj programojn.

ĜENERALAJ TASKOJ:

1. Restarigo de la agado de la ĥoro kaj la estrado «Flamo».

2. Regula eldonado de la murgazeto «Panoramo».

3. Organizo de amuzvespero.

4. Plivigligo de la kampanjo pri kolektado de monrimedoj por konstruo de la landa esperanta sidejo.

5. Organizo de laborgrupoj por konstruo de la monto-domo «Esperanto» en Vitoŝa.

6. Renovigo de la abonkotizo kaj la membrokotizo por 1961 de 250 membroj.

St. Kadiev

ESPERANTO EN LA SERVO DE LA SCIENCO KAJ LA PROFESIOJ

Esperanto devas penetri en la ĉiutagan vivon de la homoj. Ĉiu homo devas uzi Esperanton en sia laboro. Ĝi devas servi al la profesio. Tiel la lingvo fariĝos plenspire vivanta kaj efektive necesa por ĉiu homo.

Esperanto ĝis nun estas uzata precipe por korespondado kaj diversaj literaturaj belartaj verkaĵoj. Tre malofte, eĉ neniel oni uzas ĝin por sciencaj kaj profesiaj celoj — la plej grava flanko en nia ĉiutaga laboro.

Ofte min demandas diversfakaj intelektuloj: Ĉu via lingvo povas servi al mi por miaj profesiaj interesoj? Ĉu estas literaturo skribita en Esperanto por mia fakspecialco, kiam mi povas profiti de aliaj naciaj lingvoj? Ĉu mi devos perdi tempon lerni Esperanton nur por legi diversajn mondfamajn romanojn, kiuj jam estis tradukitaj en mia gepatra lingvo?

Siatempe Zamenhof skribis, ke «kiu volas lerni Esperanton nur por tuj havi profiton, ne estas utila por Esperanto». Tiu ĉi postulo estis necesa, kiam Esperanto faris siajn unuajn paŝojn. Tiam oni povis neglekti la profiteblajn homojn, kiuj metas la suprajn demandojn. Nun, post la 70-jara ekzisto de Esperanto ili estas pravaj. Ili estas la plimulto de la homaro kaj ni ne povas preterlasi ilin. Alie ni, la esperantistoj, restos vanaĵ revuloj.

La vivo montris, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ke ĝi povas servi la ĉiutagan vivon. Kiamaniere ni devas realigi tion? Solvi tiun ĉi problemon estas tasko por la estonta agado de Esperanto-movado. La servo de Esperanto al la scienco kaj la profesioj — estas la malforteca sfero de la nuna laboro de la enlanda kaj universala Esperanto-movado. Tiu ĉi demando la esperantistaro devas bone pripensadi kaj ofte pridiskutadi.

CK de BEA devas serioze okupi sin pri ĝi kaj serĉi manierojn kaj rimedojn por solvi ĝin. Tio ne estas facila afero.

Mi opinias, ke la fondiĝo de diversaj sciencaj kaj profesiaj sekcioj ĉe BEA estas ĝusta organiza formo en nia movado. Ili devas sin okupi per sia organiza laboro, praktike plenumi la taskon enkonduki Esperanton en la ĉiutagan laboron de la diversaj fakscienculoj kaj profesionistoj. CK de BEA favore rilatas al la agado de la diversaj sekcioj, kiuj ĝis nun estas fonditaj, instigante ilin. La helpo devas esti bone pripensata kaj planata, ne hazarda. La vivo de la sekcioj devas esti unu el la konstantaj kaj gravaj zorgoj de CK de BEA.

En la nomo de la Medicina Sekcio, kiel ĝia prezidanto, mi proponas, ke CK de la Asocio donu al ni kaj al la aliaj sekcioj jenan helpon:

1) Disponigi pagojn en la organo de la Asocio «Bulgara Esperantisto» pri la sekciaj aferoj — organizaj, profesiaj kaj sciencaj. Tiel la materialo presita en ĝi fariĝos pli varia kaj pli interesa por pli multaj legantoj.

2) En la komenco laŭbezone, poste periode, oni komencu eldoni bultenon stencilite, kiu en la estonteco fariĝu revuo.

En ĝi oni presos: originalajn artikolojn, resumojn, recenzojn de sciencaj verkaĵoj, bibliografion kaj sciigojn pri diversaj eldonitaj fakaj libroj, precipe de bulgaraj aŭtoroj kaj de aliaj socialismaj landoj.

Esperanto devas esti lingvo ankaŭ de la scienco. La scienculoj devas ellerni ĝin kaj verki rekte en ĝi.

D-ro T. Todorov

Supera scienca kunlaboranto ĉe la Instituto pri Kurortologio kaj Fizioterapio en Sofio.

TRA LA GAZETARO

En «**Rabotniĉesko delo**» (Sofio, 8.VII.1960) — informo de N. Ivanov pri la malfermo de Esperanto-tendaro en v. Drujevo.

La sama informo estis disaŭdigita de Radio Sofio je la 4.VII.1960.

«**Oteĉestven glas**» (Plovdiv, 9.VII.1960) — artikolo «Esperanto-ponto inter la popoloj» de Kr. Sofroniev.

«**Dunavski konservopromišlenik**» (Ruse, 15.VII.1960) — informo «Nia internacia amikeco» pri la korespondado inter la kolektivo

de la konserva kombinumo «Dunavia» — Ruse kun la kolektivo de la konserva fabriko en urbo Ismail, USSR, kaj kun la kolektivo de la konserva fabriko «Dagoma» en urbo Gdansk, Pollando.

En la sama ĵurnalo estas konstanta rubriko «Lernu la lingvon de la paco kaj amikeco». En ĉiuj distriktaj urboj de la lando, oni povas sekvi la ekzemplon de Ruse kaj speciale de k-do Jordan Kalinov.

RECENZEJO

ĈINA ANTOLOGIO — (1949-1959), kun antaŭparolo de Maŭ Dun — prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj, 412 paĝoj, eldono de Ĉina Esperanto-Ligo, 1959.

Jen fine oni povas legi la tiom senpacience atendatan ĉinan antologion, kiu laŭ sia ekstera aspekto estas tre impona libro. Bele bindita, kun orumitaj titolo kaj ornamaĵoj, ĝi povas esti valorajo en la libroŝranko de ĉiu pretendema esperantisto.

La antologio entenas entute 21 poeziaĵojn, 17 novelojn kaj tri skizojn. Ĉiuj ili estas mallongaj kaj oni povas legi ilin dum liberaj horoj aparte, ne riskante perdi la interligon.

La parto de la poezio, kies kvar unuaj poemoj estas verkoj de la prezidanto de ĈKP — Maŭ Ze-dong, ampleksas nur 42 paĝojn, kio faras la libron pli akcepteblan, precipe por novaj geesperantistoj.

El la enhavo de la antologio oni akiras konsiderindan konon pri la vivo de nova Ĉinio en periodo de la lastaj dek jaroj. Ĝi estas tute nova por la esperantistoj, kaj pro tio ankaŭ tre interesa.

La papero kaj la preso estas bonkvalitaj. En la libro oni trovas ankaŭ 14 tutpaĝajn bildreproduktaĵojn, el kiuj 4 ĉinstilajn pentraĵojn, 6 lignogravuraĵojn kaj 4 skulptaĵojn, kaj el ĉiuj ili — 3 kolorajn.

RIFUĜEJO «ESPERANTO»

En monto Vitoŝa proksime al la montodomo «Sredec» la sofiaj esperantistoj kun la helpo de la Sofia Urba Konsilantaro konstruas rifuĝejon «Esperanto». Ĝi estos moderna, komforta kaj je plena dispono de la esperantistaro.

En ĝi oni organizos dum la somero de 1961 tendarojn kun celo: praktikado de Esperanto, interŝanĝo de sperto en la propagando kaj la instruado de la lingvo. En la novembra numero de «BE» oni legos detalan artikolon pri tiu ĉi grava evento.

N. Nikolov

En la fino de la libro estas aldonitaj biografiaj notoj pri la aŭtoroj, kies verkaĵojn oni prezentas, kaj klarigoj pri la nekonataj vortoj, esprimoj ktp.

La tradukojn faris la sep spertaj kaj bone konataj al ni ĉinaj esperantistoj: S. J. Zee, Pandiŝo, Censinio, Yang Yong-sen, Laŭlum, I. Ko kaj Honfan. Lingve kontrolis: G. Ĉen kaj S. J. Zee.

Ĉar mia tasko estas nur prezenti la antologion al la bulgaraj geesperantistoj, kritikajn rimarkojn mi ne faros. Pri tio eble okupos sin iu alia bulgara sperta esperantisto. El tio tamen, kiun mi ĝis nun sukcesis tralegi supraĵe, mi konstatis, ke la traduko estas glata, stilaj kaj gramatikaj eraroj malofte troveblaj kaj preskaŭ nevideblas preseraroj. Verŝajne pro tio oni ne trovas en la libro liston de preseraroj.

Ĝojiga estas la fakto, ke en la antaŭparolo de Maŭ Dun ni legas, ke tiu ĉi libro estas la unua de la plurvoluma ĉina antologio. Ni kredu, ke ne postlonge ni povus legi ankaŭ la ceterajn partojn.

La bulgaraj esperantistoj povas akiri la Antologion per la Bulgara Esperantista Kooperativo aŭ ties 9 librejoj en Sofio, kie oni havas je dispono certan kvanton de ĝi.

Iv. Kovaĉev

GRAVA POR LA FILATELISTOJ

Serio de 22 poŝtkartoj kiuj prezentas — grandformate — ĉiujn poŝtmarkojn ĝis nun eldonitajn kun teksto en Esperanto oni povas liveri ĉe Sicilia Delegacio de Itala Esperanto-Federacio — Corso Vittorio Veneto 92 — Ragusa, Italio.

La serio kostas, inkluzive la sendelspezoj al eksterlando per rekomendita letero 800 it. lirojn aŭ 15 internaciajn respondkuponojn.

DEZIRAS KORESRONDI

VIETNAMIO

Dâng-Vinh, 21-a Phô Chô Nang Tinh Khu 1, Nam Dinh — kun bulgaraj samideanoj.

Bach Mai, Dô — Oûong-Nhà mây nûoc, Hanoj — 19-jaraĝa laboristo kun bulg. samideanoj.

Lê Liêm, 10 strato 325, Hanoj — 18-jaraĝa junulo. Interŝ. BK, IL, insignojn.

USSR

Tuletaj Nsanov, str. Lenina 30, kv. 72, Groznij — 23 jaraĝa studento, pri arto, scienco, sporto.

Stanislav Ivlev, str. Lenina 30, kv. 60, Groznij — 23 jaraĝa studento — pri filmo, arto, scienco.

Reznikov Valentin, str. Komsomolskaja d. 53, kv. 1, Liepaja. Interŝ. PM, alumentetikadojn, fotojn.

Viktor Bukin, Sverdlovsk, Ĉefpoŝto, ĝis postulo — interŝ. esperantajojn.

Vsevolod Vasiljeviĉ Kulikov, str. Sazonova, 33, Omsk 7 — instruisto en pedagogia instituto — pri matematiko.

Agiva Svetlana, str. Matrosova 9-17, Komsomol'sk na Volge — 20 jaraĝa studentino, pri literaturo, arto, teatro, baleto. Interŝ. BK.

Bereza Ivan, Dobromirka S, Zbarjskij rajon, Ternopol'skaja obl., Ukrainio — interŝ. BK, esperantajojn, revuojn.

Aleksandro Dubrovin, ul. Lenina 10-a, Galiĉ — Kostromskoj — nova esperantisto, 18-jaraĝa laboristo. Interŝ. BK, revuojn.

Aino Neeme, Pollu 3-3a, Nõmme, NSVL, ENSV, Tallin — instruistino en infandomo.

RUMANIO

Mihaie Dunăeanu, str. 7 Noiembrie 7, Oraşul Stalin 1 — 31 jaraĝa fraŭlo. Interŝ. PK, insignojn, fotografajojn.

POLLANDO

Simiela Jerzy, str. Dyrekcyjna 2/10, Katowice — 23 jaraĝa fraŭlo, pri sporto, arto — kun junulinoj.

Wojnar Stanisław, Surerchowa Osiek, Jaceł, Rzeszów — 22 jaraĝa studento — pri fotografio.

Duda Maria, ul. Orzeszkowa 30/8, Wrocław 2 — 18 jaraĝa fraŭlino, pri filatelio. Interŝ. PM, BK.

Kooperativaj kaj ŝtataj entreprenoj deziras per helpo de Esperanto korespondi, interŝ. sperton kaj aranĝi reciprokajn vizitojn kun similaj bulgaraj entreprenoj. Pri detalaj informoj skribu al: Pola Esperanto-Asocio, Garncarska 18, Gdansk.

Marek Kurylowicz, Zeromskiego 26, Kielce — 15-jaraĝa lernanto, kun gelernantoj. Interŝ. librojn, ilustritajn gazetojn. Interesiĝas pri ŝakludo.

HUNGARIO

Ladislav Turay, Aprilis 4 utja 44, Szeged — 18 jaraĝa studento — interŝ. gramofondiskojn.

ĈSR

Petr Mošnička, Byšice 283, kor. Melník — 19 jaraĝa fraŭlo, kun gejunuloj.

GDR

Klaus — Ulrich Riemann, Bleicherode/Harz, Ostbahnhof, 19 jaraĝa junulo — pri lingvaj demandoj. Interŝ. PK, PM.

USA

La ĝenerala sekretario de la Internacia Klubo Kolektanta Esperantajojn serĉas korespondantojn, kiuj afrankas siajn leterojn per esp. PM. Li respondas per BK afrankitaj per usonaj aŭ unuiĝantaj PM. Interŝ. esp. glumarkojn kaj stampojn. Li serĉas la stampojn: Vizitu la 33-an Esperanto-kongreson en Varna, 20-22.VII.1958. Rekompenco laŭ deziro. Louis Obreczian, Box, 51, Waterman, Penna.

